

JARRAPORTO de ESPÉRANTO-FRANCE 2019–2020

1. Konsciigo (Informado)

- 1.1. Gazetara komunikado
- 1.2. Le Monde de l'Espéranto (LME)
- 1.3. *Esperanto-Aktiv'*
- 1.4. Foiroj

2. Kapabligo

- 2.1. Kulturcentroj
- 2.2. Franca Esperanto-Instituto (FEI)
- 2.3. Interretaj kursoj
- 2.4. KER-Ekzamenoj
- 2.5. Komisiono Espéranto à l'école
- 2.6. Afrika solidareco
- 2.7. Ĝemelaj urboj

3. Komunumo

- 3.1. Butiko
- 3.2. Sidejo
- 3.3. Landa kongreso
- 3.4. Preleg-turneoj

4. Kunordigado kaj funkciado

- 4.1. Rilatoj kun UEA
- 4.2. Komitato kaj membraro
- 4.3. Financo

5. Jaraj raportoj de la regionaj asocioj

6. Jaraj raportoj de la fakaj asocioj

Enkonduko

Ĉi-jare denove ni proponas al vi Jaran Raporton de Esperanto-France, prezentatan kaj ordigatan laŭ la strukturo de la laborplano de la estraro de UEA, tio estas laŭ la 4 K: Konsciigo, Kapabligo, Komunumo kaj Kunordigado.

Se vi havas demandojn, vi povas fari ilin dum la Ĝenerala membrokunveno okazonta rete la 15an de majo matene, aŭ skribi al estraro@esperanto-france.org.

Grandan dankon al ĉiuj estraranoj kaj komisiitoj, kiuj kontribuis al la kompilado de la *Jara Raporto*: Clément Baleyte, Susanna Beglaryan, Katja Boen, Florian Cezard, Raymonde Coquisart, Guy Camy, Didier Janot, François Lo Jacomo, Edmond Ludwig, Clair Mahé, Vinko Markovo, Yves Nicolas, Claude Nourmont, Laure Patas D'illiers, Marion Quenut, Emmanuelle Richard, Axel Rousseau, Bert Schumann, Pascal Vilain,

Agrablan legadon deziras al vi,

la estraro de Esperanto-France.

1. Konsciigo (Informado)

- 1.1. Gazetara komunikado
- 1.2. Le Monde de l'Espéranto (LME)
- 1.3. Esperanto-Aktiv'
- 1.4. Foiroj

1.1. Gazetara Komunikado

Multaj artikoloj aperis en la franca gazetararo:

<https://esperanto-france.org/articles-publies-dans-la-presse-en-2020>

1.2. Le Monde de l'Espéranto

Ĉefredaktoro : Claude Nourmont. Grafika laboro : Emmanuelle Richard

- Regule kunlaboras al la aktualaĵoj en la franca aŭ/kaj al la kulturaj paĝoj: Bernard Behra, Raymonde Coquisart, Mireille Grosjean, Hori Jasuo, Anne Jausions, Didier Loison, François Lo Jacomo, Edmond Ludwig, Flo Martorell, Yves Nicolas, Gilles Tabard, Renée Triolle, la partoprenantoj de diversaj gravaj staĝoj k.a., kaj ankaŭ eksterlandaj esperantistoj.
- La franclingvajn tekstojn kontrollegas Yannick kaj Janine Dumoulin. La esperantlingvajn tekstojn kontrollegas Brian Moon.
- Danke al laboro de Claude Bensimon, *Le Monde de l'Espéranto* estas nun enretigata en la retejon de Esperanto-France: <https://esperanto-france.org/le-monde-de-l-esperanto>
- En ĉiu numero aperas speciala dosiero (foje en la franca) pri grava temo, franclingvaj kaj esperantlingvaj aktualaĵoj, informoj pri la agadoj, kulturaj paĝoj, laŭeble dulingva paĝo kun traduko de literatura teksto originale verkita en Esperanto, vojaĝaj notoj kaj aliaj rubrikoj.

- Aperis du numeroj en la lasta periodo; entute oni raportis pri okazaĵoj en dudeko da landoj de ĉiuj kontinentoj.
 - Numero 604 2019 : Année Internationale des langues autochtones
 - Numero 605 L'UNESCO, une priorité du mouvement espérantiste

Raportas Claude Nourmont

1.3. Esperanto-Aktiv'

La reta informletero *Esperanto-Aktiv'*, verkita en la franca lingvo, aperas ĉiumonate. UFE kaj JEFO kune dissendas ĝin, de pli ol 6 jaroj, al ĉiuj membroj kaj al personoj, kiuj interesiĝas pri Esperanto (ĉefe personoj, kiuj aliĝis al la interretaj kursoj de JEFO).

- Pli ol 4000 personoj ricevas la leteron retmesaĝe, ĉirkaŭ 50 personoj ricevas ĝin perpoŝte.
- Vi povas legi la malnovajn leterojn tie: esperanto-france.org/esperanto-aktiv kaj proponi al interesitaj personoj senpage aboni laŭ la sama retejo.
- Bonvolu sendi viajn ideojn, sugestojn, artikolojn, anoncojn pri eventoj al teamo.esperanto.aktiv@esperanto-france.org

Kvar rubrikoj

- **Découvertes** (*Malkovroj*) prezentas temojn rilate al la esperanta movado, al lingvoj aŭ, pli ĝenerale, al kulturaj aferoj, ĉu fundamentajn artikolojn, ĉu intervjuojn de diversaj agantoj de Esperantujo; pluraj homoj verkis en tiu rubriko.
- **Ils l'ont fait... dans leur région** (*Okazis*) listigas la ĵusajn agadojn de la lokaj kluboj; tiun rubrikon prizorgas Raymonde Cocquisart kaj Dominique Lacambre.
→ Post ĉiu evento, bonvolu sendi fotojn kaj artikoleton priskribante la okazaĵojn, la etoson, vian sperton.
- **Calendrier** (*Okazos*) vidigas la ĉefajn venontajn eventojn, en Francio, en Eŭropo kaj ankaŭ tra la cetero de la mondo, eĉ plurajn monatojn antaŭe; tiun rubrikon prizorgis Dominique Lacambre.
- **Lu, vu, écouté ce mois-ci** (*Leginda, spektinda, aŭskultinda*) prezentas recenzon de ĉu libro, ĉu muzikalbumo, ĉu filmo, freŝe publikigita aŭ pli malnova; pluraj homoj verkis en tiu rubriko.

Redaktora teamo

Raymonde Coquisart (redaktado de rubriko *Ils l'ont fait...*, preparo kaj dissendo de la papera versio), Dominique Lacambre (kalendaro), Claude Nourmont, Emmanuelle Richard (teknika spertulo; reteja mastrumado; reta dissendo), Axel Rousseau (kunordigado, redaktado), Jean-Pierre Rouvet (enpaĝigo de la PDF).

Listo de artikoloj

| Monato | N° | Malkovroj | Leginda, spektinda, aŭskultinda |
|-----------|--------|--|--|
| 01 / 2020 | EA 108 | Rencontre avec un correcteur bénévole | <i>Tagoj kaj ruinoj</i> , de Jaume Grau Casas |
| 02 / 2020 | EA 109 | Une semaine pour apprendre l'espéranto | <i>La Krubalo</i> , de Julia Donaldson et Axel Scheffler |
| 03 / 2020 | EA 110 | Restez à la maison... avec l'espéranto ! | Beletra Almanako N.31 |
| 04 / 2020 | EA 111 | Participez à la vie des l'association ! | <i>La Strato de Tanja, Vivo en Rusio 1917-2017</i> , de Kalle Kniivilä |
| 05 / 2020 | EA 112 | Échec et mat pour l'espéranto | <i>La vidvino kaj la profesoro</i> , de Ronald Cecil Gates |

| | | | |
|-----------|--------|---|--|
| 06 / 2020 | EA 113 | Au «service civique» de l'espéranto | <i>La domination de l'anglais : un défi pour l'Europe</i> , de Robert Phillipson |
| 07 / 2020 | EA 114 | Pierre Delaire : l'espéranto pour vocation | <i>La Hobito, aŭ tien kaj reen</i> de J. R. R. Tolkien |
| 09 / 2020 | EA 115 | Robin, illustrateur-graphiste et espérantiste | <i>Amo kaj malamo</i> , de Julian Modest |
| 10 / 2020 | EA 116 | Entretien avec deux nouveaux «komitatanoj» | <i>Kumewawa, le fils de la jungle</i> , de Tibor Sekelj |
| 11 / 2020 | EA 117 | Rencontre avec <i>Libera Folio</i> | <i>22 Poèmes en espéranto</i> , de Bronisław Kamiński |
| 12 / 2020 | EA 118 | Espéranto en Périgord | <i>La Eta Princo</i> de Antoine de Saint-Exupéry |

Raportas Emmanuelle Richard

1.4. Foiroj

La foiron pri matematikaj ludoj, kiun de pluraj jaroj partoprenas la Francilia federacio, organizas ekde 2020 la asocio Animath. Ĝi okazis rete, de la 28a de majo ĝis la 1a de junio, kun tiucela filmeto prezentanta Esperanton al matematikistoj, kaj ĉiutage duhora reta diskuto kun publiko, ne multnombra sed restanta longe konektita. Deĵoris kvar membroj.

Raportas François Lo Jacomo

2. Kapabligo

2.1. Kulturcentroj

2.1.1. Greziljono - Kulturdomo de Esperanto (MCE Grésillon)

2.1.2. Kvinpetalo (Bouresse)

2.2. Franca Esperanto-Instituto (FEI)

2.3. Interretaj kursoj

2.4. KER-Ekzamenoj

2.5. Esperanto en lernejoj

2.6. Afrika solidareco

2.7. Ĝemelaj urboj

2.1. Kulturcentroj

2.1.1. Greziljono – Esperanto-Kulturdomo (MCE Grésillon)

Espéranto-France ree estas komitatano de Greziljono ekde 2020.

Reprezentanto de Esperanto-France: Didier Loison

Propraj staĝoj

- Entute: 41 tagoj, 1205 tranoktoj, 2725 preparitaj manĝoj, por 205 homoj el kiuj 25 infanoj.

- Printempaj kaj jarfina staĝoj nuligitaj pro kronviruso, la aliaj okazis
- Someraj staĝoj dum 28 tagoj en julio kaj aŭgusto kun entute 152 personoj
- Multaktiveca staĝo kun ĥoro Interkant kaj NaturArto en oktobro kun 29 personoj
- Staĝo Aŭtune en oktobro kun 24 personoj
- Laboroj kun 15 volontuloj okazis dum 130 tagoj
- Instalado de dormĉambro por rulseĝulo en la liva kromdomo
- Firmao renovigis la tutan tegmenton de la liva kromdomo

Aliaj okazaĵoj

- Luado al ne-esp-istaj grupoj por financi laborojn: 10 luoj dum entute 18 noktoj. E-istaj luantoj ĝuas rabaton!
- La asocio Kampo de la Griloj helpas la kulturdomon kaj rilatas kun la loka franclingva publiko
- Krom nia kutima programo, kursoj kaj aktivaĵoj por infanoj kaj plenkreskuloj, kun gastoj el diversaj landoj kaj amika etoso, ni serĉas E-asociojn kaj aliajn partnerojn, kiuj okazigu en Greziljono siajn proprajn kongreson aŭ staĝojn.

Raportas Bert Schumann

2.1.2. Kvinpetalo (Bouresse)

Staĝoj

Malgraŭ la pandemio ni sukcesis organizi plurajn staĝojn; unu okazis tuj antaŭ la trudenfermiĝo, aliaj estis prokrastitaj en aŭgusto kaj aŭtune, kiam eblis libere veturi.

Februaro: lingva staĝo por progresintoj, gvidita de Catherine Kremer, paralele staĝo prepare al la triagrada ekzameno, gvidita de Brian Moon.

Aŭgusto: promenadoj tra naturo kaj Vikipedio, gviditaj de Alain Favre (fungologo, botanikisto); multaj vikipediaj artikoloj estis kreitaj, pluraj dekoj estis plibonigitaj.

Oktobro: staĝo por triagrada ekzameno de FEI, gvidita de Brian Moon.

Daŭre organizas la bibliotekon de la kulturcentro Philippe Cousson. Grande progresis la katalogigo.

- Li ankaŭ zorgas pri farigo de laboroj por ke la centro estu en bonaj materiaj kondiĉoj (tegmentoj, humideco, farbado, ktp). Zorgas pri la ĝardeno Bernard Lagrange.
- Prizorgas la retpaĝojn de Kvinpetalo Yannick Dumoulin.
- Bonaj kontaktoj en la vilaĝo per sistema informado ĉe la lokaj komercistoj (i.a. dank' al la kalendaretoj); eta fako pri Esperanto en la mediateko (kun regula ricevo de *Le Monde de l'Espéranto*).
- Kvinpetalo helpas konigi Bouresse tra la tuta mondo. En diversaj okazoj oni mencias pri Kvinpetalo en esperantaj revuoj.

Raportas Claude Nourmont

2.2. Franca Esperanto-Instituto (FEI)

FEI estas lingva institucio komuna al UFE kaj SAT-Amikaro, je la dispono de ĉiuj esperantistoj kaj esperantistaj organizoj en Francio. Ĝi pretas helpi ne nur en okazigo de ekzamenoj, sed ankaŭ en lingva kontrolo de Esperanto-tekstoj kaj lernolibroj verkitaj de franclingvanoj, aŭ tradukitaj el la franca. Tia kontrolo freŝdate okazis por dulingva porinfana libreto preparata de iu FEI-ano.

Ĉar la sansituacio ne ebligis normalan kunvenadon en Parizo en oktobro, ĝia jarkunsido okazis sabaton la 27an de februaro 2021 per komputila interparolo, partoprenita telefone de du anoj.

FEI-ekzamenoj

Pro la pandemia situacio, la nura raportenda ekzamen-sesio okazis en Le Beausset (83) la 19an de septembro 2020. Du kandidatoj sukcesis la unuagradan ekzamenon kaj unu sukcesis la duagradan. Aliaj sesioj planitaj en Lille aŭ en Parizo estis prokrastitaj aŭ nuligitaj.

La studendaj verkoj por la *Atesto pri Supera Lernado* (komuna parto de la triagrada ekzameno, trapasenda antaŭ la fakaj branĉoj), plu konsistas el:

Ne ekzistas verdaj steloj, de Liven Dek

Viktimoj, de Julio Baghy

La Zamenhof-strato, de Roman Dobrzyński

La bona lingvo, de Claude Piron

Konsisto de la FEI-anaro dum la mandatperiodo 2019-2022

- Prezidanto: Vinko Markovo
- Vic-prezidanto: Maksimiliano Gverino
- Kasisto: Michel Dechy
- Vic-sekretario: Didier Janot
- Ekzamena komisiono: Renée Triolle (direktoro), Elisabeth Barbay, Jesper Jacobsen, Anne-Sophie Markov
- Respondeculo pri la retejo: Pierre Dieumegard
- Ceteraj membroj: Christian Lavarenne, François Lo Jacomo, Pascal Vilain

Venontaj planitaj trejn- aŭ ekzamen-sesioj

Inter la lastaj sukcesintoj pri la komuna trunko de la kapableco, du intencas trapasi la fakan branĉon pri sciencoj kaj teknikoj, kaj unu la fakan branĉon pri pedagogio. Tamen momente neniu dato estas fiksita por tiuj sesioj.

Retejo

<http://franca-esperanto-instituto.net>

Por pliaj informoj, interalie venontaj ekzamensesioj kaj taskoj por memtrejniĝo.

Raportas Vinko Markovo

2.3. Interretaj kursoj

Espéranto-France mastrumas 3 interretajn kursojn: la programo *Kurso de Esperanto*, la *Cours gratuit d'espéranto en 10 leçons* kaj *Gerda Malaperis* por progresantoj.

46 volontuloj korektas (45 en 2018-2019) korektas tiujn kursojn. Dum la 12 monatoj de oktobro 2019 ĝis septembro 2020, 1541 lernantoj aliĝis (1511 en 2018-2019) kaj 137 finlernis la elektitan kurson (303 en 2018-2019). Dum tiu periodo, ni plibonigis la retejon:

- Ni ŝanĝis la prezentadon de la korelativoj.
- Ni aldonis voĉ-registradon de diversaj tekstoj aŭ vortoj.
- Ni ankoraŭ korektis diversajn cimojn kaj tajperarojn.

Notinde: Espéranto-France subvencias la realigadon de KER ekzameno (nivelo A1/A2). Tiujn ekzamenojn trapasos la lernantoj je la fino de la *Cours gratuit d'espéranto en 10 leçons* (A1) kaj *Gerda Malaperis* (A2).

Tiujn ekzamenojn realigas Noémie, kiu estas dungita kiel "Service Civique" por la asocio Espéranto-Développement-45.

Raportas Axel Rousseau

2.4. KER-ekzamenoj

En 2020, bedaŭrinde la planitaj sesioj de KER-ekzamenoj, en Greziljono (planita la 24an kaj 25an de aprilo) kaj en Parizo dum la tutmonda sesio (unue planita la 20an de junio, sed prokrastita al la 28a de novembro), estis ambaŭ nuligitaj pro la pandemio. La tutmonda sesio tamen okazis la 28an de novembro en dekdu urboj tra la mondo. Kaj progresis la preparado de la tute reta KER-ekzameno, kiu devus ekfunkcii en 2021. Ĝi ebligas trapasigi la ekzamenon en multe pli da urboj ol ĝis nun. Regulaj kontaktoj kun Katalin Kováts daŭras pri tiu ĉi afero.

Raportas François Lo Jacomo

2.5. Komisiono Esperanto à l'école

Agadraporto de la Komisiono Esperanto à l'école : lernojaro 2019-2020

El la 6 aktivaj lernejoj dum 2018-2019, nur 4 daŭrigis ilian kurson... ĝis la komenco de la pandemio, kiu devigis ilin ĉesi tian instruadon. Niaflanke, la komisiono plustrebis laŭeble konsciigi kaj, i.a., varbi geinstruistojn al nia agado ĉefe post kaj dank'al la eldono de la metodo Multlingva Akcelilo (MLA). Resume, ni :

- partoprenis al la *Fête de l'Huma 2019*.
- denove, aperigis tutmondan alvokon, por ke ĉiu Esperanto-instruisto en lernejo registru sian kurson en la kursejo de Edukado.net. Sensukcesa agado.
- kreis kaj disdonis antaŭ la lernejoj de du urboj ĉirkaŭ 300 novajn flugfoliojn, por informi kiom Esperanto helpas la lernadon de aliaj lingvoj. Sekve, nur unu instruisto kontaktis nin.
- daŭre renkontis kelkajn politikistojn : verŝajne unu el tiuj renkontiĝoj estos fruktodona.
- petis novan rendevuon al J.-M. Blanquer kaj al la DGESCO: sed, tuj poste ekokazis la pandemio: kompreneble ni ne plu insistis.
- dum la urba balotkampanjo ni proponis al la UFE-membraro, ke ĉiu sendu leteron al ĉiu kandidato je la atendo de la ministro JMB. Niascie, bedaŭrinde, nur ĉirkaŭ seso el ni tion faris!
- tuj post la apero de la MLA-metodo ni informis ĉiujn francajn bazlernejestrojn (≈ 53 000). Entute, nur 6 respondis ! Tamen, nekompreneble, tiu grava ilo enhavas neakcepteblajn erarojn, kiujn ni konigis al la respondeculino (Maja Tišljar). Malgraŭ pluraj petoj por esti sciigitaj kiel staras la korektado, ni ne ankoraŭ ricevis ian ajn respondon.
- sensukcese relanĉis la federaciojn PEEP-n kaj FCPE-n por kunlaborado
- sensukcese petis al UFE agi, por ke Unesco rekonu Esperanton kiel francan nematerian heredaĵon.
- sensukcese kontaktis la Nederlandan Esperanto-asociation, por ke ili provu enkonduki Esperantan kanton dum la malfermo de la Eŭrovisio-konkurso.

Konklude: 2017-2018 estis esperiga; 2018-2019 estis mezbona; 2019-2020 estis nebona kaj ni timas ke 2020-2021 ne estos plibona.

Kelkfoje ŝajnas al ni, ke ni iamaniere Donkiĥotumas kaj ke nia movado, ne vere volas venki ĉar restas ne sufiĉe kunlaborema kaj reaktiva.

Tamen, unu jaro plia ni daŭrige uzos ĉiajn eblojn niajn por enkonduki Esperanton en lernejojn.

Raportas Guy Camy

2.6. Afrika Solidareco

Bedaŭrinde, ni ne ricevis agadraporton de Afrika Solidareco.

2.7. Ĝemelaj urboj

La jaro ne estis tiel sukcesa sed ni tamen notu diversajn interesajn temojn. La ĝemeliĝo Parizo/Romo perfekte bone funkcias dank al la monataj retaj renkontiĝoj lerte gvidataj far Marc Ĝiro, prezidanto de francilia federacio. Notinde estas multaj partoprenantoj el pluraj landoj. Diversaj aliaj el tiuj kunvenoj ankaŭ okazas sed mankas raportoj. Pri la paĝo Fejsbuko, mi daŭre aperigas informojn regule. Pasintjare estis 162 ŝatantoj, nun 183. Mi nepre devas reaperigi informojn en rubriko de UEA forumo.

Pri la temo Ĝemelaj Urboj okazis telefonaj kaj retaj kunsidoj kun pluraj respondeculoj province. Mi preparis novajn artikolojn france kaj esperante por la retejo de Esperanto-France. La plej urĝa plano estas funkciigi la komisionon pri ĝemelaj urboj kadre de Esperanto-France sed unu el la tri membroj estis devigata rezigni pro personaj kialoj. Mi daŭre kontaktas la respondeculojn eksterlande kaj la federaciojn de Esperanto-France.

Raportas Raymonde Coquisart

3. Komunumo

- 3.1. Butiko
- 3.2. Sidejo
- 3.3. Landa kongreso
- 3.4. Preleg-turneoj

3.1. Butiko

Plej bonaj vendoj dum la jaro 2020.

| | | |
|--|------|----------|
| <i>L'espéranto, c'est dans la poche !</i> | 2180 | 1374,05€ |
| <i>Eta Princo</i> | 141 | 1282,80€ |
| <i>Metodo 11 (ed. 2018)</i> | 167 | 1220,85€ |
| <i>Grand dictionnaire Espéranto-français</i> | 45 | 560,00€ |
| <i>La Templo de l' Suno</i> | 40 | 412,00€ |
| <i>Grammaire ABC d'espéranto</i> | 12 | 279,66€ |
| <i>Grand dictionnaire français-espéranto (avec supplément)</i> | 26 | 260,00€ |
| <i>Poŝamiko</i> | 46 | 241,88€ |
| <i>Metodo 11 (ed. 2020)</i> | 26 | 173,10€ |
| <i>Dictionnaire pratique</i> | 11 | 171,20€ |
| <i>Dictionnaire de poche (F/E - E/F)</i> | 37 | 145,20€ |
| <i>Espéranto par la méthode directe</i> | 17 | 124,91€ |
| <i>Cours rationnel d'espéranto (éd. 2006)</i> | 12 | 118,50€ |

3.2. Sidejo

La sidejo de Esperanto France elkore dankas vin pro via atento kaj subteno dum la tuta komplika jaro 2020! Malgraŭ la malfacilaĵoj rilate al Covid ni ricevis kaj traktis multajn telefonalkvokojn, retmesaĝojn same kiel poŝtleterojn adresitaj al la sidejo:

- preparis kaj sendis pli ol 360 mendojn al niaj membroj kaj aktivuloj;
- registris pli ol 800 aliĝojn al Esperanto-France kaj abonojn al LME;
- registris pli ol 220 aliĝojn al UEA;
- same kiel pli ol 150 abonojn al internaciaj revuoj

Ni prizorgis ankaŭ pri daŭrigo de laboro por ordigi kaj numerigi nian arkivan trezoron:

<https://arkivo.esperanto-france.org/>

Aktuale la sidejo estas malfermita al publiko lunde, marde, merkrede (tel : 01 42 78 68 86)

Ĵaŭdo estas rezervita por dosieroj traktendaj, sed ni ricevas ankaŭ antaŭvidintajn aŭ pasantajn vizitantojn.

Vi estas bonvenaj dum viaj vojaĝoj en Parizo kaj tra Parizo, nia skipo (Liliane Bon, Maria Fessler, Jean-Louis Pouillet, Susanna Beglaryan) plezure montros al vi la sidejon, la arkivon, la librojn...

Raportas Susanna Beglaryan, kunordiganto de la sidejo

3.3. La landa kongreso

Pro la sansituacio, la kongreso ne okazis en 2020.

3.4. Preleg-turneoj

Claude Rouget, el Norvegio

26 kluboj kandidatis por akcepti Claude Rouget sed ni povis elekti nur 9 klubojn por tiu trisemajna turneo. De la 20a de novembro ĝis la 10a de decembro 2019, Claude estis akceptita de la kluboj en Orléans, Tours, Angers, Lannion, Vannes, Gironde, Saint-Étienne, Lyon kaj Grenoble. La temoj pritraktis la bicikladon de Claude de Norvegio ĝis Portugalio, la vivon, politikon, historion en Norvegio, liajn esperantistajn travivaĵojn.

Yves Nevelsteen, el Belgio

De la 5a ĝis la 19a de novembro 2019, Yves vizitis 9 klubojn laŭ jena itinero: Paris, Périgueux, La Roche-sur-Yon, Rennes-Montfort, Pleudaniel, Saint-Brieuc, Hérouville, Thionville kaj Strasbourg.

La plej ofte pritraktita temo estis *Vivi en lando kun tri oficialaj lingvoj* (Pleudaniel, Périgueux, Rennes-Montfort, Hérouville kaj Thionville), *Ni nun alimaniere vidas Belgion* (Hérouville). Li ankaŭ prezentis la temojn *Oftaj eraroj kaj novaj vortoj* en La Roche-sur-Yon kaj Strasbourg; *Retservoj* en Pleudaniel kaj *200 esperantaj marknomoj* en Parizo.

Suzanne Roy, el Kebeko

La unumonata prelegvojaĝo komenciĝis la 4an de januaro 2020 en Luksemburgo. Suzanne Roy poste veturis ĝis Belgio por viziti la klubojn en Liège, Antverpeno kaj Bruselo. La posta itinero okazis en Francio: Lille, Amiens, Paris, Hérouville, Saint-Malo, Rennes, Douarnenez, La Roche-sur-Yon, Bourges, Châteauroux.

Konkludo

Ambaŭ turneoj estis tre sukcesaj kun tri talentaj prelegantoj kaj allogaj temoj. Bedaŭrinde, neniu alia turneo okazis pro la pandemio

Raportas Yves Nicolas

4. Kunordigado kaj funkciado

- 4.1. Rilatoj kun UEA
- 4.2. Komitato kaj membraro
- 4.3. Financoj

4.1. Rilatoj kun UEA

Ĉefdelegito de UEA por Francio : Renée TRIOLLE.

Espéranto-France havas regulajn kontaktojn kun UEA.

La sidejo zorgas pri perado de kotizoj kaj aliaj servoj.

Reprezentanto de Espéranto-France ĉe la komitato de UEA, Claude Nourmont:

- Partoprenis la komitatajn kunsidojn de UEA dum la Virtuala Kongreso
- Partoprenas en la diskutlisto komitato de UEA regule tra la jaro;
- Raportas al UEA pri okazaĵoj en Espéranto-France;
- Reciproke informas la membrojn de Espéranto-France pri gravaĵoj ĉe UEA.

Raportas Claude Nourmont

4.2. Komitato kaj membraro

Elektita en Dovro (aprile 2019), la Komitato kunvenis kvar fojojn: majon 2019, oktobron 2019, januaron 2020, septembron 2020.

Reprezentas la membrojn (2019-2020):

- | | |
|----------------------|----------------------|
| • Alexandre André | • Aleks Kadar |
| • Claude Bensimon | • Michael Leibmann |
| • Raymonde Coquisart | • Didier Loison |
| • Bernard Cornevin | • Jean-Lucien Mazeau |
| • Xavier Godivier | • Sébastien Montagne |
| • Julia Hédoux | • Claude Nourmont |
| • Jesper Jacobsen | • Armand Salek |
| • Maurice Juy | • Gilles Tabard |

Estraro (2019-2020):

- | | |
|-----------------------|--------------------|
| • Prezidanto | Didier Loison |
| • Vicprezidanto | Maurice Juy |
| • Ĝenerala sekretario | Gilles Tabard |
| • Vicsekretario | Michael Leibmann |
| • Kasisto | Sébastien Montagne |
| • Vickasisto | Jean-Lucien Mazeau |
| • Estrarano | Raymonde Coquisart |

Reprezentantoj de la membraj asocioj (2019-2020):

- Aŭvernio: Jean-Pierre Boulet
- Bretonio: Josette Ducloyer
- Langvedoko-Rusiljono: Florian Cézard
- Norda Francio: Michel Dechy
- Orientfrancio: Gilbert Stambach
- Parizo-Francilio: Marianne Pierquin
- Poitou-Charentes: M.-F. Condé-Rey
- Provenco: Pascal Vilain
- Rodanalpoj: - -
- JEFO (junuloj): Lucas Teyssier
- FET (laboristoj): Flora Markov
- FKEA (katolikoj): Michèle-Abada Simon
- GEE (instruistoj/antoj): Didier Janot

La komitato estis parte renovigita en septembro 2020, en Parizo.

Reprezentas la membrojn (2020-2021):

- Alexandre André
- Véronique Bichon
- Bernard Cornevin
- Bruno Flochon
- Xavier Godivier
- Jesper Jacobsen
- Vincent Jacques
- Maurice Juy

- Aleks Kadar
- Michael Leibmann
- Jean-Lucien Mazeau
- Sébastien Montagne
- Claude Nourmont
- Armand Salek
- Eric Streichemberger
- Gilles Tabard

Reprezentantoj de la membraj asocioj (2020-2021):

- Aŭvernio: Rémi Deneu
- Bretonio: Laurent Peuch
- Langvedoko-Rusiljono: Florian Cézard
- Norda Francio: Michel Dechy
- Orientfrancio: Gilbert Stambach
- Parizo-Francilio: Marc Giraud
- Poitou-Charentes: M.-F. Condé-Rey
- Provenco: Pascal Vilain
- Rodanalpoj: - -
- JEFO (junuloj): Lucas Teyssier
- FET (laboristoj): Flora Markov
- FKEA (katolikoj): Bertrand Sajus
- GEE (instruistoj/antoj): Didier Janot

Estraro (2020-2021):

- Prezidanto
- Vicprezidanto
- Ĝenerala sekretario
- Vicsekretario
- Kasisto
- Vickasisto
- Estrarano
- Estrarano

Bruno Flochon
Maurice Juy
Emmanuelle Richard
Eric Streichemberger
Jean-Lucien Mazeau
Armand Salek
Alexandre André
Xavier Godivier

Kelkaj statistikoj pri la membraro kaj la membrara evoluo

Estis 628 membroj je la fino de la periodo 2019-2020 (30a de septembro 2020), kontraŭ 672 membroj je fino de 2018-2019 kaj 605 membroj je fino de 2017-2018). Vidu la suban tabelon / grafikon montrantan la evoluon de la membraro ekde 2014-2015.

| Federacio | 2019-2020 | 2018-2019 | 2017-2018 | 2016-2017 | 2015-2016 | 2014-2015 |
|-------------------------|------------|------------|------------|------------|------------|------------|
| (sen federacio) | 43 | 34 | 38 | 59 | 61 | 53 |
| Aquitaine | 59 | 19 | 66 | 52 | 54 | 66 |
| Auvergne | 12 | 60 | 12 | 11 | 11 | 16 |
| Bourgogne-Franche-Comté | 20 | 10 | 23 | 31 | 33 | 24 |
| Bretagne | 29 | 29 | 35 | 35 | 26 | 31 |
| Centre-Ouest | 53 | 26 | 50 | 44 | 47 | 49 |
| France-Est | 43 | 58 | 38 | 37 | 41 | 43 |
| Paris-Île-de-France | 108 | 47 | 129 | 118 | 140 | 144 |
| Languedoc-Roussillon | 29 | 12 | 26 | 25 | 24 | 31 |
| Midi-Pyrénées | 13 | 71 | 11 | 12 | 9 | 13 |
| Nord | 64 | 137 | 45 | 32 | 27 | 36 |
| Normandie | 15 | 28 | 22 | 21 | 22 | 22 |
| Poitou-Charente | 8 | 6 | 7 | 6 | 7 | 12 |
| Provence | 44 | 40 | 37 | 38 | 44 | 44 |
| Rhône-Alpes | 88 | 95 | 65 | 66 | 71 | 82 |
| | 628 | 672 | 605 | 579 | 617 | 666 |

4.3. Financoj

Vd. la finanĉan raporton.

5. Jarraportoj de la regionaj asocioj

5.1. Akvitanio

Bedaŭrinde, ni ne ricevis agadraporton de la federacio.

5.2. Fédération Espéranto-Auvergne (Aŭvernio)

Bedaŭrinde, ni ne ricevis agadraporton de la federacio.

5.3. Fédération Espéranto-Bretagne (Bretonio)

La agadraporto ankoraŭ ne estas preta.

5.4. Burgonjo-Franĉkonteo

Bedaŭrinde, ni ne ricevis agadraporton de la federacio.

5.5. Fédération Espéranto-Centre-Ouest (Centrokcidento)

Ne ekzistas vigla federacia asocio.

Ni proponas al vi ankaŭ legi la raporton pri la Kultura Esperanto-Centro Grésillon (vd. paragrafo 2.1.1).

5.6. Fédération Espéranto-Languedoc-Roussillon (Langvedoko-Rusiljono)

Nîmes

En Nimo, dum la izoliĝado, la instruisto daŭrigis la kurson per interreto kun kvar lernantoj, uzinte bildstrion de Tinĉjo, partigitan sur la ekrano. Sed li perdis du lernantojn, kiuj ne ŝatas interreton...

Montpellier

Ni renkontiĝis trifoje en 2020 : januare, februare, oktobre.

5 gekomencantoj, 3 gekomencintoj kaj 3 progresintoj partoprenis niajn kursojn, sed bedaŭrinde ni ne plu instruis dum kaj post la izoligado.

Ni planis ankaŭ organizi koncerton de Kjara, itala kantistino, sed pro la izoligado, ni tion nuligis.

Septembre 2020, ni partoprenis la lokan asociajn feston, kiu okazis rete.

Ni ankaŭ kunlaboris rete kun la federacio de Midi-Pyrennées por pliproksimigi la du federaciojn kaj proponi komunan gazeton.

Kun la asocio "Animation Création Culture Origami" (ACCO) ni ricevis pozitivan respondon de la urbodomo de Montpellier por organizi ekspozicion *Origami kaj Esperanto, du lingvoj por internacia komunikado* en la domo de Internaciaj Rilatoj de Montpellier. Tiu ekspozicio devis okazi en aprilo 2020 kaj dum la ekspozicio ni intencis fari atelierojn kaj prelegojn origamio-Esperanto por larĝa publiko kaj ankaŭ por fakuloj de instruado, reprezentantoj de diversaj internaciaj kluboj kaj ludajn atelierojn por la infanoj. La inaŭguro kun la reprezentanto de la urbocentro devis okazi la 11-an de aprilo, sed pro la kvaranteno, kiu komenciĝis en marto, ĉio estis nuligita.

Tiun ekspozicion ni rigardis kiel konatigo de larĝa publiko kun Esperanto kaj preparo de la bazo por organizi internacian renkontiĝon/festivalon pri tiu sama temo en Montpellier dum aŭtuno.

Plie, dum la virtualaj renkontiĝoj de SES kaj VK (Virtuala Kongreso-UK), ni faris prelegojn kaj gvidis atelierojn pri origamio per Zoom kaj ni ricevis proponon de IREA (Irana Esperanto Asocio) fari regulajn origamiajn atelierojn en Esperanto per Zoom.

Tiuj atelieroj komenciĝis la 16-an de aŭgusto 2020 kaj ni faris ĉiudimanĉe (nun estas jam 28 atelieroj). Plena informo pri la atelieroj aperas en eventaservo.org.

Dum la atelieroj ni celas konatigi esperantistojn kun origamio ne nur kiel arto sed ankaŭ kiel scienco. Temas pri uzo de origamio en diversaj kampoj: scienco, teknikoj, arkitekturo, dezajno, pedagogio kaj arto-terapio; en la du lastaj oni aplikas origamion kiel ne-vorta lingvo por faciligi la komunikadon.

Ankaŭ ni volas montri, ke origamio kaj Esperanto havas multajn komunajn trajtojn: logikon kaj simplecon, ili uzas la principon "neceso kaj sufiĉo", ambaŭ ili laboras kiel konstrua ludo, kreante ĝojan etoson kaj faciligante komunikadon. Ni pensas, ke origamiistoj kaj esperantistoj, laborante kune, povas helpi unu la aliajn por disvastiĝi en la mondon. Origamio povas esti bona ilo por allogi homojn al Esperanto.

Nun ni havas en la partoprenantoj ne nur esperantistoj sed ankaŭ origamiistoj kiuj volas lerni kaj komencis lerni Esperanton.

Raportas Florian Cezard

5.7. Fédération Espéranto-Limousin

Ĉi-jare oni malmulte povis fari pro la reguloj kadre de la sanproblemo. Ni devas travivi tiun periodon almenaŭ kun la kerno de la movado.

Ne eblis organizi elmontraĵojn por neesperantistoj, ne fari budojn... La kutimaj kulturaj eventoj ne okazis.

Kelkaj babilkunvenoj. Oni foje elektis, fari du malgrandajn samtage anstataŭ unu grandan.

Ĉirkaŭ la 15 de decembro (18): "Sankto-Zaza" en Limoĝo, ĉe Brunel kun 14 samideanoj.

Traduko al la Okcitan lingvo de la flugfolio pri la *Internacia Tago de la Gepatra Lingvo* kaj Esperanto.

Disvastiĝo en Okcitanlingvaj medioj.

Interreta organizo de interesaj legadoj fare de Isabelle Jakob (Sumo Esperanto).

En Korezo.

Malregulaj kunvenoj en la Kultura Centro de Brivo. Kurso dum la unua parto, amika babilado dum la dua.

Du amikaj babilkunvenoj en agrabla kamparo.

AG 2020 de Espéranto Limousin en Brivo en marto 2020.

En Altvieno

Du plaĉaj kunvenoj en bela pejzaĝo kun ĉirkaŭ 15 samideanoj, dank' al Isabelle.

Isabelle Jakob daŭrigas la kursojn. Nur unufoje ili povis kuniĝi, sed ili daŭrigas perrete kun la libro *Vojaĝo tra la Esperanta Mondo*.

Raportas Clair Mahé

5.8. Fédération Espéranto-Nord (Nordfrancia Esperanto-Federacio)

Regiona kunordigado

Membraro. La Federacio nombris entute 64 membrojn (kp. kun 71 membroj en 2018-2019), laŭ la nova interasocia kotizosistemo:

Amieno: 18; Araso: 16; Lillo: 14; Valencieno: 4;
individuoj-membroj: 12.

Federaciaj kunsidoj. Okazis federacia ĝenerala asembleo la 15an de decembro 2019 en Salouël

Rilatoj kun UFE. Prezidanto Michel Dechy reprezentis la Nordfrancian Federacion en la komitato de UFE.

Informado kaj kumonikado

Gazeto kaj retejo. La Federacio eldonis retan informbultenon Norda Kuriero. Ĝi estis sendita papere al federacianoj, kiuj ne uzas Interreton. Ĝi aperis dufoje en la periodo: en novembro 2019, februaro 2020.

La dulingva federacia retejo viziteblas je la adreso: www.esperanto-nord.org.

La 1an de januaro 2020 la Facebook-paĝo de la Lilla klubo fariĝis la paĝo de la Nordfrancia Federacio: www.facebook.com/esperanto.hautsdefrance

Informado en diversaj medioj. En Lillo, pro la pandemio, Michel Dechy ne povis prezenti Esperanton en bazlernejoj. Li intervenis kadre de la punkto de bibliotekoj en mediateko de Tourcoing kaj en MRES en Lillo por prezenti Esperanton. La Lilla klubo partoprenis en la asocia foiro de Villeneuve-d'Ascq kaj la bildrakonta foiro de Lys-lez-Lannoy en novembro 2019. La Lilla klubo starigis Esperanto-budon en la granda Lilla stratbazaro.

En Salouël la Amiena klubo profitis la viziton de Suzanne Roy el Kebekio por okazigi renkonton kun du klasoj de bazlernejo.

De januaro ĝis marto 2020, la Amiena klubo realigis diversajn agadojn kadre de sia partnereco kun la Muzeo-Domo de Jules Verne kaj la bibliotekoj de Amieno:

- legadoj de fragmento de *La Eta Princo* en Esperanto kun traduko en la franca;
- familiaj ludoj por malkovrigi Esperanton al infanoj kaj iliaj gepatroj;
- prelego *Esperanto, lingvo por la paco kaj la amikeco inter popoloj kaj homoj* la 29an de februaro;
- prelego *Jules Verne esperantisto* de István Ertl, tradukisto de pluraj verkoj de Jules Verne, la 7an de marto 2021 (spektebla per Jutubo).

Instruado kaj ekzamenoj

Kursoj kaj staĝoj. Diversajn kursojn organizis la kluboj (lernjaro 2019-2020):

- Amieno: kurso por 2 komencantoj;
- Araso: kurso por 10 homoj (komencantoj kaj progresantoj, komuna instruado kaj paroligaj kursoj);
- Bersée: kurso por komencantoj kaj kaj progresantoj;
- Lillo: 5 komencantoj kaj 3 progresantoj en MRES (Maison régionale de l'environnement et des solidarités); 3 komencantoj kaj 3 progresantoj en la Lilla Universitato (Villeneuve-d'Ascq); 2 lernantoj en la Universitato pri Libera Tempo.

Pro la pandemio ĉiuj kursoj haltis en marto, sed pluraj rekomenciĝis rete aŭ eĉ telefone.

Federaciaj ekzamensesioj. Ne okazis ekzamensesio.

Kulturo kaj aranĝoj

La Federacio akceptis plurajn eksterlandajn prelegantojn, kiuj vizitis unu aŭ plurajn klubojn: Aleksandro Melnikov (Rusio) en oktobro 2019, Suzanne Roy (januaro 2020).

Pluraj amienanoj partoprenis la ludon Esperanto-Sumoo organizatan de Hori Jasuo, kiu instigas legi librojn en Esperanto. Ili partoprenis ankaŭ en "Esperanto Poŝt-Kruĉiĝo".

Pluraj federacianoj partoprenis en internaciaj renkontiĝoj: Edmond kaj Arlette Plutniak en la Novjara Renkontiĝo (Germanio) kaj en la *Mediteranea Esperanto-Semajno* (februaro); Joëlle Muller en la tritaga Printempa Reta Kursaro (aprilo).

Jean-Claude Roy kaj la Amiena klubo daŭrigis la partnerecon kun la Muzeo-Domo de Jules Verne, kaj prezentis teatrumitan viziton de la Domo de Jules Verne dum la federacia kongreso okazinta la 15an de decembro. La pandemio ne ebligis publikigi la novelon de Jules Verne *Fantazio de Doktor' Oks* (Une Fantaisie du Docteur Ox).

La Lilla klubo organizis sian Zamenhof-feston en la 15a de decembro 2019 en MRES (asociara domo): en ĝoja etoso la partoprenantoj ludis, interalie per malnovaj regionaj ludoj, aŭskultante muzikon kaj babilante meze de glasoj kaj kukoj.

Raportas Katja Boen

5.9. Fédération Espéranto-Normandie (Normandio)

Nia normanda asocio regule aperigis sian bultenon (3 numerojn jare).

Antaŭ la pandemio okazis kursoj en Avranches (50) kadre de la loka "Université Inter Âges" kun Christian Lévesque kiel intruisto, en Flers (61), kun Anne-Marie Leprévost, en Hérouville (14), kun tri niveloj.

Regulaj kunvenoj ankaŭ okazis en Le Havre (76) kun Sylvie Caron kaj Patrice Dufeu.

Pro la pandemio, ĉiuj kursoj malaperis krom en Hérouville-Saint-Clair, kiu organizis ĉiusemajnan virtualan kurson por komencantoj (Yves Nicolas) ekde la dua izoligo. La klubo ankaŭ organizis ekde marto ĉiusemajnan renkontiĝon per Zoom, tre ofte anoncita en Eventa Servo kaj vizitata de inter 10 kaj 18 homoj el la klubo mem sed ankaŭ el pluraj landoj. Ĉiusemajne, nova temo (prelego, ludo, ktp.). Patrice Dufeu (76), Rémi Troisgros (50) kaj Yves Nicolas (14) estas "i-kurso" korektantoj.

La ĝenerala asembleo kiu estis antaŭvidita por majo 2020 en Avranches estis nuligita.

Mikaelo Bronŝtejn el Rusio intervenis en Avranches kaj en Hérouville en februaro 2020.

Nia normanda asocio sukcesis organizi sian tradician "turisman tagon" en oktobro 2019 en Carentan (50) (gvidita de Rémi Troisgros. 35 partoprenantoj el la kvin normandaj departementoj) kaj en Falaise en oktobro 2020 en Falaise (14) (kun 23 partoprenantoj el la kvin normandaj departementoj).

Raportis Yves Nicolas

5.10. Fédération Espéranto-France-Est (Orientfrancio)

Pro la kronviroza pandemio la agado de Espéranto-France-Est estis draste reduktita.

Pro la pandemio ankaŭ ne povis okazi Ĝenerala Membrokunveno. Post perreta konsultado de la komitato de EFE, la estraro decidis organizi perleteran balotadon, proponinte al la membraro plilongigi de unu jaro la mandaton de la komitatoj, baloti pri la agadraporto kaj la financaj raportoj (EFE – LIBROSERVO).

Perletera balotado (pro la korona viruso) pri la jaro 2019 farita en oktobro 2020.

Ne povis okazi la antaŭvidita printempa staĝo en Art-sur-Meurthe, kio devigis la organizantan grupon de Nancy akcepti novan daton en 2021 por ne perdi la antaŭpagon necesan por rezervi la datojn. Je la nuna momento ankoraŭ ne certas – pro la daŭra kronviroza pandemio - ĉu la staĝo povos okazi en printempo 2021.

Daŭrigis sian eldonan laboron André GROSSMANN kaj Edmond LUDWIG, kiuj sukcesis pluprovizi la abonantojn je la kvar numeroj de *LA INFORMILO*.

Krome prizorgis la eldonon de la kunmetitaj Avaj anguloj de samideano Armand HUBERT aperintaj felietone en *LA INFORMILO*. La libreto nomiĝas *GARDU VIN, KNABO!* Ankaŭ la ilustraĵojn realigis Armand HUBERT, kiu mem eldonis franclingvan version de la verko *Fais Gaffe, garçon!*

Jean-Luc THIBIAS daŭre okupiĝas sukcese pri la riĉ-enhava LIBROSERVO: <http://esperanto.france.est.free.fr/>

Kiel kutime André GROSSMANN prizorgis la retpaĝaron de EFE: <http://esperanto.france.est.free.fr/>

Virtualaj kunvenoj ankaŭ okazis.

- La retejo <https://eventaservo.org/> informas pri la plej multaj virtualaj kunvenoj organizitaj tra la mondo. Plej multaj estas programitaj ĉe Zoom. Tiam necesas peti enskribon por ricevi la identigilon kaj la pasvorton.
- Populara estas la kunveno de Londona kaj Antverpena kluboj en vendredo vespere. Plej ofte estas planita prelego aŭ kvizo. Kelkfoje estas pli ol 60 partoprenantoj. Inter ili Bernard kaj Andreo. Post la prelego eblas fari demandojn kaj sekve restas tempo por libera babilado.
- La grupo de Frajburgo proponas virtualan kunvenon ĉiun lundon vespere ekde la 20a15. Ĝin gvidas Ursula Niesert kun partoprenantoj de nia trilandana angulo.
- Krome André Grossmann jam sukcesis aliĝi al kunveno de la Esperanto-grupo de Slovenio kaj de la grupo de Valencio en Hispanio.
- Per la sistemo skajpo eblas kunveni en pli malgrandaj rondoj post interkonsento de la tago kaj horo laŭ eŭropa, brita kaj japana tempo.

Raportas Edmond Ludwig

5.11. Fédération Espéranto-Paris-Île-de-France (Parizo-Francilio)

1. Administrado

1.1. *Membraro*

en 2020 : 94 (en 2019 : 156 – en 2018 : 161 – en 2017 : 120)

1.2. *Jarkunveno*

La jarkunveno ne okazis en 2020 pro kronviroza pandemio.

Jen la nova komitato: Michèle Abada-Simon, Pierre Gauthier, Marc Giraud, Didier Janot, Sylviane Lafargue, Aurélien Lestage, Didier Loison, François Lo Jacomo, Jean-Lucien Mazeau, Laure Patas d'Illiers, Marianne Pierquin, Guillaume Vera-Navas.

En junio la komitato elektis la novan estraron: Marc Giraud (prezidanto), Didier Loison (kasisto), Pierre Gauthier (vickasisto), Laure Patas d'Illiers (sekretario), Aurélien Lestage (vic-sekretario).

Ĉiuj mandatoj finiĝos dum la jarkunveno 2021.

1.3. *Komitataj kunvenoj*

Inter la lasta ĜA kaj la venonta ĜA, la komitato kunsidis/os 6foje : 02/06, 04/09, 06/11 (specifa pri strategio), 11/12, 29/01, 19/02.

Ankaŭ okazis informokunsido por ĉiuj membroj : 10/10.

1.4. Rilatoj kun Esperanto-France

Marc Giraud estas nia delegito ĉe la komitato de Esperanto-Francio. Diversaj bonvolemluloj de nia federacio helpas ĉe la sidejo pri diversaj taskoj. Pluraj franciliaj esperantistoj estas membroj de la komitato de Esperanto-France kaj partoprenas en la vivo de la landa asocio.

Komunikado

La komunikado de la federacio unue disvolviĝas per la retejo *esperanto.paris*. Sekve kaj kaskade, la informoj estas publikigitaj en pluraj sociaj retoj. Por atingi pli rapidan kaj efikan rezulton ni starigis novan organizadon danke al respondeculoj pri diversaj taskoj : *esperanto.paris* (D. Janot, A. Lesage), Esperanto Aktiv (L. Patas d'Illiers, M. Pierquin), Facebook (M. Pierquin, M. Giraud), *dissendo-listoj* (L. Patas d'Illiers, M. Giraud), Duolingo (L. Patas d'Illiers), Amikumu (L. Patas d'Illiers, M. Giraud), Twitter (P. Gauthier), Telegramo (L. Patas d'Illiers)

2. Agadoj

2.1. *Eventoj*

En 2020 nia federacio nuligis preskaŭ ĉiujn ĉeestajn eventojn : *esperanto-kafejoj*, kulturaj vesperoj, koruso, jarkunsido. Estu certaj ke ekde kiam la sanitara situacio pli malpli renormaliĝos, ni ĝoje revivigos tiujn eventojn!

Tamen okazis tiuj ĉeestaj eventoj :

- Eo-kafejoj: 11/01 (Café des phares), 08/02 (Café "Chez Margot"), 12/09 (Café de l'industrie)
- Piknikoj: 11/07 (Buttes Chaumont), 08/08 (Bois de Vincennes)
- Prelegoj : 15/01 (Suzanne Roy), 22/01 (Ilona Koutny)

Ni organizis aŭ partoprenis en multaj retaj eventoj:

- Foiro pri matematikaj ludoj : filmeto 8'37"-longa, afiŝita en la oficiala retejo, kaj kvar duhoraj retaj akceptoj (28 - 31 majo), kun malpli da vizitantoj ol se estus ĉeesta foiro, sed pli longdaŭraj vizitoj.
- Babilrondoj organizitaj kun nia ĝemela urbo Romo. Parizo kaj Romo ĝemeliĝis en 1956, esperantistoj de ambaŭ urboj decidis vigligi kaj fortigi tiun specialan rilaton. Ĝis nun tiu rilato vivas nur per interreto, sed kiam eblos, ni planos vojaĝon al tiu belega urbo! Kadre de la ĝemeliĝo inter Parizo kaj Romo, ni jam organizis 6 babilrondojn pri diversaj temoj. La 7a okazos komence de februaro kaj temos pri literaturo. Pluraj romaj kaj parizaj membroj interŝanĝas mesaĝon kadre de nia nova koresponda servo. Aliaj retaj projektoj aperos ĉi-jare.

2.2. *Instruado*

En 2020 nia federacio ofertis 4 kursojn :

- ĉeesta kurso por komencantoj de Michèle Abada-Simon (neniu aliĝo)
- ĉeesta kurso por mezniveluloj de Michèle Abada-Simon (nuligita)
- reta kurso por mezniveluloj de Marc Giraud (7 homoj)
- reta kaj laŭeble ĉeesta kurso de François Lo Jacomo (3 ĝis 5 homoj)

Raportas Laure Patas d'illiers

5.12. Fédération Espéranto-Provence (Provenco)

1. Membraro

Je la 31a de decembro 2020, Espéranto-Provence havis 82 membrojn (+3)

2. Asocioj, grupoj kaj individuaj membroj

2.1 *Deklaritaj asocioj*

Kiuj plu ekzistas kaj pli malpli aktivas:

05 - Gap: Espéranto-Gap (1 federacia membro)

13 - Marseille: 14 federaciaj membroj (ttt-ejo: <http://esperanto.marseille.over-blog.com>)

83 - Saint-Raphaël: Espéranto-Club Saint-Raphaël (18 federaciaj membroj)

83 - Le Beausset: Espéranto-Le Beausset (8 federaciaj membroj)

84 - Avignon: K.E.C.A.v(Kultura Esperanto-Centro de Avinjono) (3 federaciaj membroj, kiuj plu ekzistas administracie sed ne aktivas)

04 - Manosque: E.K.E.M. (Esperanta Kulturo en Manosque) (3 federaciaj membroj)

13 - La Roque-d'Anthéron : Espéranto-La Roque

13 - Miramas: G.E.M. (Groupe Espéranto Miramas)

2.2 *Antenaj grupoj de Espéranto-Provenco*

13 - La Ciotat (2 federaciaj membroj)

83 - Hyères (5 federaciaj membroj)

3. *Administrato*

Estraranoj (3): prezidanto (Pierre Oliva), sekretario (Pascal Vilain), kasisto (Nicole Lafitte)

Aliaj komitatanoj (6): Monique Arnaud, Marc Gallardo, Josiane Moirand, Thierry Spanjaard, Renée Triolle, Gilles Wallez

Gazet-respondeculo: Pascal Vilain

Retej-respondeculoj: Thierry Spanjaard, Pascal Vilain

Reprezentanto de nia federacio ĉe Espéranto-France: Pascal Vilain (anstataŭanto: Renée Triolle)

Membrokunveno

Ĝi okazis en Les Issambres (83) la 1an de marto, okaze de la Mediteranea Esperanto-Semajno.

21 partoprenantoj + 8 senditaj rajtgitiloj

Komitatkunsidoj :

Marto 1: Les Issambres (post la membrokunveno). Aliaj prokrastitaj pro la sankrizo

4. *Instruado*

Kursoj

- En la kluboj de Saint-Raphaël, Le Beausset, La Ciotat, Marseille, Avignon,

Staĝoj

- februaro 29 / marto 7 - Les Issambres (83): Mediteranea Esperanto-Semajno
- decembro 1/2 - Le Beausset (83): Kultura Semajnfno (nuligita)

Ekzamenoj

- septembro 19 – Le Beausset: FEI-ekzamenoj (1a kaj 2a gradoj); tri kandidatoj, ĉiuj sukcesis

5. Informado – komunikado

- kiam eblis ĉijare, disdonado de *Le Monde de l'espéranto* (Renée Triolle en La Ciotat kaj Marseille, Rosy Inaudi en sia regiono, Pascal Vilain en Hyères)
- kiam eblis ĉijare, en Marseille (Brasserie les Danaïdes, 4 square Stalingrad, 13001 Marseille), la 1an ĵaŭdon de ĉiu monato: Lingva kafejo
- kiam eblis ĉijare, en Hyères (Hotelo Ibis-Gare), la lastan merkredon de ĉiu monato : Lingva kafejo
- septembro - Gap, La Ciotat, Marseille, Le Beausset, Saint-Raphaël "Forumo de la asocioj"

6. Klubaj eventoj

- januaro 7 - Marseille: reĝkuka festeto
- januaro 15 - La Ciotat: reĝkuka festo + membro-kunveno
- januaro 25 - Saint-Raphaël: reĝkuka festo + membro-kunveno
- februaro 8 - Le Beausset: oficiala disdono de diplomoj al 4 ekzamenitoj de la FEI-ekzamenoj
- junio 28 - Les Arcs-sur-Argens: pikikno de la klubo Fréjus-Saint-Raphaël
- februaro 25 - Marseille: prelego en "CIRA" de tri rusinoj pri "Volgogrado"
- septembro 10 - Marseille: prelego en "Cité des associations" de Floréal Martorell, pri Vinilkosmo

7. Movadaj eventoj

- junio 20 / septembro 20: *Mondafest' 2020*, reta festivalo de Esperanto en kiu partoprenis pluraj Provencanoj.
- julio 4 – Sainte-Énimie (48): Nicole Lafitte kaj Pierre Oliva partoprenis en la Ĝenerala Kunveno de la asocio *Espéranto-Info*.
- julio 27 / aŭgusto 1 - Kastelo Greziljono: 1a Verda Naturisma Semajno, organizita de La Kulturdomo kaj INOE. Partoprenis pluraj membroj de *Espéranto-Provence* ; prelegis Rosy Inaudi kaj Thierry Spanjaard.
- aŭgusto 1-8: Virtuala Kongreso de Esperanto. Partoprenis pluraj Provencanoj; per receptoj el Reunio partoprenis Maggy kaj Philippe Combot en la virtuala bankedo.
- septembro 12-13 - Parizo: komitatkunsido kaj Ĝenerala membro-kunveno de *Espéranto-France*. Partoprenis Pascal Vilain ; Eric Streichemberger, membro de nia federacio, estis elektita kiel estrarano de nia landa asocio.
- decembro 12: Reta Esperanto-Festo organizita de *Zspéranto-France*. Partoprenis Monique Arnaud, Thierry Spanjaard kaj Pascal Vilain
- dum la tuta jaro: Nicole Lafitte kaj Pascal Vilain partoprenas en verkateljero iniciata de A. Löwenstein
- dum la tuta jaro: Jean-François Cousineau estas korektanto de la revuo *Espéranto-Info*.

8. Kulturaj kaj alispecaj eventoj

- januaro 27 - Les Pennes-Mirabeau, en collège Monod: prezentado de plurmonata laboro pri *Genocido kaj diskriminacioj* - laborgrupo pri antaŭjuĝoj parolis pri Esperanto.
- februaro 22 - La Ciotat: *Internacia Tago de la Gepatra Lingvo*
- septembro 13 - Embrun (05): Festivalo *T'es rien sans la Terre*. Eo-budo pri kiu zorgis Monique Arnaud

9. Diversaĵoj

- julio/septembro : Alain Rémy bicikle vojaĝis tra Eŭropo.

10. Venontaj okazaĵoj

- Les Issambres: *Mediterranea Esperanto-Semajno 2021* (nuligita)
- novembro aŭ decembro 2021 - Kultura Semajnfino en Le Beausset: datoj, kursoj kaj distra programo decidotaj

5.13. Fédération Espéranto-Poitou-Charentes (Puatuo-Ĉarentoj)

La federacio estas dormanta. Tamen gravajn eventojn okazigas en Puatuo-Ĉarentoj la kulturcentro pri esperanto Kvinpetalo en Bouresse (86) (vd. ĉisupre la paragrafon 2.1.2 Kvinpetalo).

5.14. Fédération Espéranto-Rhône-Alpes (Rodanalpoj)

La federacio ne plu ekzistas.

5.15. Fédération Espéranto-Midi-Pyrénées (Sudo-Pireneoj)

La federacio voĉdonis sian malaperon fine de 2019 kaj kreadon de nova federacio kune kun tiu de Langvedoka-Rusiljono, kaj de komunan bultenon. Sed la afero ankoraŭ ne antaŭeniris.

En la regiono, la portalon mastrumas EKC de Tuluzo kaj ĝiaj volontuloj provas kolekti artikolojn de regionanoj por vivigi ĝin.

<https://occeo.net>

6. Jaraj raportoj de la fakaj asocioj

6.1. Espéranto-Jeunes (JEFO)

Kompreneble pro la sansituacio, la kutimaj eventoj ne povis okazi ĉi-jare (ludvesperoj, renkontiĝoj...). Tamen, pluraj el niaj membroj partoprenis diversajn retajn eventojn tra la jaro, kaj planas partopreni la venontajn, ke ĝi estu ĉeeste aŭ rete.

Post pozitiva sperto en reklampartneriĝo kun la jutubkanalo *L'astrolabe*, ni ŝatus daŭrigi tiajn projektojn ĉi-jare kun alia jutubisto. (https://www.youtube.com/watch?v=T1_AEfAS9tY)

Ni ankaŭ planas labori pri la renovigo/ĝisdatigo de nia retejo, kaj pridiskuti/ĝisdatigi niajn statutojn.

Raportas Clément Baleyte

6.2. Groupe des enseignants espérantophones (GEE)

La GEE (Groupe des enseignants espérantophones) / ILEI-Francio esta kaj faka asocio de Espéranto-France, kaj landa sekcio de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI).

Ĝi grupigas:

- instruistojn en bazlernejoj, mezlernejoj kaj universitatoj,
- kursgvidantojn kaj instruantojn,
- ĉiujn homojn kiuj interesiĝas pri instruado.

Ĝia ĉefa celo estas disvastigi instruadon de Esperanto, interalie ĉe baz/mezlernejoj kaj universitatoj.

Raportas Didier Janot

6.3. Franca Katolika Esperanto-Asocio (FKEA)

Bedaŭrinde, ni ne ricevis agadraporton de la federacio.

6.4. Fédération espérantiste du travail (FET)

Bedaŭrinde, ni ne ricevis agadraporton de la federacio.